# Gu kaj Pil

## La vulpidoj




Yanpetro KAVLAN




Iam, en la najbaraĵo kie okazis la aventuroj de Kuniks, la kuniklo*, gevulpoj zorgis pri siaj ĝemeloj, Gu la plej vigla kaj Pil kiu lin sekvis.

Kuniks, la kuniklo*: Bildstrio legebla tie ĉi : http://www.yanpetro-kavlan.fr/433462919




Dum monato la vulpino mamnutris siajn du ĝemelojn en vulpejo kaŝita sub la radikoj de plurjarcenta olivarbo. Dum ĉi tiu tempo, la vulpa patro helpis sian kunulinon per ĉasado. La mamnutrado, iom post iom, ŝanĝiĝas. La gepatroj alportas nutraĵon en la kaŝejon. La idoj eke eliras kaj ludas ekstere sed ili restas proksime kaj sub la gardado de sia patrino.




La tempo pasis, la ĝemeloj ne plu estas suĉinfanoj, ili iĝas junaj vulpoj. Ili pensas nur pri ludado.



Post proksimume 9 semajnoj la vulpidoj ne plu nutras sin je la mamo, la vulpino demamigis ilin. Nun ili manĝas viandon, fruktojn kaj kelkajn kreskaĵojn.




Dum la sekvantaj monatoj iliaj gepatroj devos instrui al ili multajn aferojn.
La du junaj vulpoj ne estas atentemaj.




Foje la vulpa patro admonas siajn du diabletojn.